

## Senbariera transporto – faka libro

La tiurilata libro alportas resumon de teoriaj kaj praktikaj sciigoj el problemaro de transporto de personoj kun limigita kapablo de moviĝo kaj orientiĝo, precipe de personoj kun difektoj de vidkapablo, movebleco kaj aŭdosento.

La unua parto de la libro (ĉapitroj 1 – 5) pritraktas historion de formado de senbariera medio, ĝeneralajn sciigojn pri movigo, orientiĝo kaj komunikado de la menciataj uzantoj de publika trafiko, analizon pri stato de la sistemo pri alireblo de publikaj trafikiloj kaj al jura agadkampo en tiu ĉi sfero en la Ĉeĥa Respubliko.

La dua parto, la plej vasta (ĉapitroj 6 – 13), alportas metodikon de formado de la senbariera medio en publika trafiko, respektive trafik-konstruaĵoj kaj resumas postulojn por senbariere alirebla infrastrukturo, veturiloj, informadsistemoj kaj personaro de trafikistoj en sistemo de la publika transporto.

La tria parto de la libro (ĉapitroj 14 – 16) temas pri senbariera teknologio de la transporto kaj diskonigas solvon de la elektitaj problemoj (ekz. trafikiltransiron de pasaĝeroj), respektantaj specifikon de movigo de pasaĝeroj kun limigita kapablo de la moviĝo kaj orientiĝo, tempaspektojn de transporto de pasaĝeroj sur ĉaretoj en urba amastransporto (UAT), kreadon de senbarieraj survojiĝoj por piedirantoj sur areo de la urbo kaj simile. En tiu ĉi parto de la libro la leganto ankaŭ ekscias pri iuj teknikaj helpiloj por vidkapable difektitaj uzantoj de la trafiko kaj pri organizoj kaj institucioj, kiuj tiujn ĉi personojn asociigas kaj defendas iliajn interesojn kaj rajtojn.

La lasta parto de la libro entenas indekson de la terminoj, registrojn, bibliografion de la fontoj, grafikajn eldonaĵojn kaj la ĉeĥa – angla – germana – esperantan vortareton de la elektitaj fakaj terminoj en problemaro de alireblo de la publika trafiko kaj transporto.



## BEZBARIÉROVÁ DOPRAVA

Jaroslav Matuška

Institut Jana Pernera  
Pardubice 2009

Pri la aŭtoro:

*Jaroslav Matuška* studis ĉe la Universitato *Pardubice*, Trafika fakultato „*Jan Perner*“ (1995 Inĝ., 1998 *Ph.D.*). Li laboras en la katedro de teknologio kaj reguligado de trafiko en la nominata fakultato.

Pri la temo senbariera transportado kiel sistemo li okupiĝas ekde la jaro 2002. Li respondecas kaj prelegas krom pri la instruobjekto Senbariera transporto ankaŭ pri la instruobjektoj Internacia transporto, Teknologio de fervojtrafiko, kaj Eksploatado de fervojo kaj fervojtrafiko.